n-ro 49

julio 1995

ISSN 0941-9306

# La Merkato

Ĝenerala Kunveno (laŭstatuta ĉefkunveno) de IKEF dum UK

je jaŭdo, 27 julio 1995, 13.00-14.30 h., en salono Setalo

Tagordo:

1. Raporto pri la agadoj de IKEF dum la jaro 1994
2. Financa raporto pri la jaro 1994
3. Decido pri la uzo de la financa rezulto pri 1994
4. Elekto de estraranoj
   La estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro König, s-ro Rotsaert, s-ro Yamasaki, kies ofico finiĝos ĉi-somere, denove pretas kandidatiĝi
5. Diskuto kaj decido pri plialtigo de nia kotizo
6. Ĝenerala diskuto pri celoj kaj agadoj de IKEF
7. Diversaĵoj

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Enhavo

Dumkongresaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Kiel vi ne iĝu viktimo de ekonomio-krimuloj . . . . . . . 5
Ferŝtalo-giganto en Oriento . . . . . . . . . . . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . 7

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Identecŝildaro estas jara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: ĉe s-ro Frans Josef Braun,
Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: ĉe s-ro Roland Rotsaert,
Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32.(0)50.330004.

Atentu ! Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))Q

La jara membreca kotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 14 usonaj dolaroj.
Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per eŭroĉeko (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT.

Perantoj:

Cinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István GETHER, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco PICASSO, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 1400 enoj)

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Dumkongresa vizito al Komerca Ĉambro, fabriko... en Tampereo

Tia vizita estas planita. Bedaŭrinde ĝis redaktofino de La Merkato ne alvenis precizaj informoj.

Petu tiajn informojn ĉe la budo de Flandra E-Ligo/Monato en la kongresejo. Tie ankaŭ eblas pagi vian kotizon kaj ricevi informojn pri IKEF.

Strategio-kurso dum la UK

Ĉiutage, je 12.20-14.00a horo (krom je merkredo), Hermann BEHRMANN (Paderborn, Germanio) donos kurson "Ekkonu viajn fortojn". Ankaŭ pri tio petu pliajn informojn en la kongresejo.

Temas pri la EKS-strategio de la germana sistemesploristo kaj entreprenkonsilanto Wolfgang MEWES (Frankfurt). MEWES analizis milon da sukcesoj ĉe firmaoj kaj karieruloj kaj konstatis sen iu dubo:

| |
|---|
| Sukceso dependas nur de la ĝusta strategio |

Komerca Ĉambro Colmar (Francio)

Chambre de Commerce et d'Industrie de Colmar et du Centre-Alsace eldonas liston de neokupitaj profesiaj ejoj en lingvoj franca, germana, angla kaj esperanta.
Adreso: 1, place de la Gare, B.P. 7, F-68001 COLMAR CEDEX; fakso 89.20.20.21.

Germanio: malnovaj bankbiletoj senvaloriĝos

Ekde la 1a de julio 1995 ĉiuj malnovaj germanoj bankbiletoj perdos sian valoron. Eblos ŝanĝi ilin nur ĉe filioj de la centra banko (Landeszentralbanken). Onidire en orienta Eŭropo ankoraŭ cirkulas grandaj kvantoj da malnovaj biletoj falsigitaj aŭ akiritaj per krimaj agoj.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Televida elsendo pri Esperanto en Francio

En LM48 (p. 19) estis anoncita E-programo por geinfanoj. Ĝi estis elsendita laŭplane sur ĉeno Canal J, je sabato 27a de majo (19.00), dimanĉo 28a de majo (12.30) kaj lundo 29a de majo (10a kaj 19a) en elsendo Regarde le monde (Rigardu la mondon).

## Radio Aŭstria Internacia

elsendas en Esperanto je dimanĉo 04.30-04.55 [6155 k 13730 kHz] kaj 11.30-11.55 [6155 kHz] h. MET (UTC + 2 h.) Informoj: Radio Aŭstrio Internacia, Esperanto-Redakcio, A-1136 WIEN; fakso + 43+ 1 878 78-4404; E-poŝto: info(a)rai.ping.at.

## Esperantomono

S-ro Johannes JanKowski (Am Wemphof 5, D-44379 DORTMUND) esploras la historion de Esperanto, speciale rilate al mono kaj medaloj. Mankas al li informoj pri la "Universala Spesmila Banko" kiu ĉirkaŭ 1927 mallongdaŭre funkciis. Tiu banko eldonis biletojn de duona, 1, 2, 5 kaj 10 spesmiloj. S-ro JanKowski sukcesis akiri serion da tiaj biletoj, sed mankas la bileto de 1 spesmilo. Kiu havas ekzempleron de la mankanta bileto, bonvolu sendi ĝin (aŭ fotokopion).

## Universala kodaro por profesioj ?

Legante recenzon de usona CD-ROM-disko kun industriaj informoj (PhoneDisc Business '95, Digital Assistanca Inc., Bethesda MD, fakso 617-639-2900) mi malkovris ke en Usono ekzistas "SIC" kodaro. "SIC" estas mallongigo de Standard Industrial Code (normigita industria kodo) per kiu eblas ekkoni la ativecon de iu kompanio. Ĉu iu havas pli da informoj pri "SIC", aŭ pri simila kodaro kiu ankaŭ enhavas ne-industriajn profesiojn ? Tia kodaro (iom simpligita, eble 2- aŭ 3-cifera) povus utili por mallonge kaj tamen akurate registri ies aktivecon en ekzemple la IKEF-identecŝildaro aŭ la UEA-jarlibro. rr

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Kiel vi ne iĝu viktimo de la ekonomio-krimuloj

Laŭ la kriminologoj - la homoj kiuj esploras la kialojn kaj la leĝecojn de la krimeco - la krimo posedas tri, en grava grado egalajn, flankojn: (1) la krimulo kun lia krima konduto; (2) la situacio; (3) la viktimo kun konduto pli malpli provokanta la krimulon. En la nuna situacio unu el la plej esperigaj formoj por prevento de ekonomia krimo estas, ke la viktimoj mem malpliiĝu per ŝanĝo de sia konduto. Tiel, ili evitas la riskon iĝi viktimoj.

Bulgaro Dinko Kânĉev, eksa prokuroro kaj kriminologo kun pli ol dekjara sperto, asertas ke granda parto de la novaj "aktoroj" sur la merkato ne estas preparitaj por la riskoj en la nova socia medio kaj ofte pro sia konduto apriore sin metas en la rolo de suferanto. La skipo de s-ro Kânĉev, surbaze de sia multjara sperto en la esploro de la ekonomia krimeco, klasifikis kelkajn grupojn de krimoj, kiuj plej ofte minacas la privatajn komercistojn kaj produktistojn:

1. Diversaj specoj de trompaj agoj ligitaj kun kontraktado de varoj kaj servoj.
2. Agoj flanke de la dungitoj en la firmao, kiuj rekte damaĝas ĝin, de rekta alproprigo ĝis gvido de la firmaaj aferoj kontraŭ la utilo de la posedanto.
3. Klasikaj havaĵaj krimoj, kiel ŝtelo, rabo kaj ĉantaĝo (pli konata sub la nomo [reket]).

Post analizo iĝas evidente ke por prevento de la krimoj, la komercistoj ne povas fidi nur je sia propra vivosperto. Ili devas esti provizitaj kun specifaj konoj. Tiujn ĉi konojn en grava parto eblas ricevi de la komputiligita eksperta sistemo (KES) ellaborita de kriminologa skipo de s-ro Kânĉev. Ili nomis ĝin "VIKTIM", ĉar ĝi instruas kiel ne iĝi viktimo. Ludante per komputilo la estro de la firmao devas honeste respondi je ĉirkaŭ 90 demandoj. Pere de ili KES pritaksas kiaj estas la riskoj iĝi viktimo de 17 grupoj da krimoj. Al la demandoj oni respondas nur per "jes" aŭ "ne"; tio postulas preskaŭ nulan komputil-klerecon. Ne eblas registri la respondojn sur disko, disketo aŭ printaĵo. Tiel la informoj pri la konduto kaj stato de la firmao malaperas kun la malŝalto de la komputilo.

KES donas konkretajn rekomendojn por malpliigi aŭ eviti riskoportantan konduton. Se la riskon oni taksas super asignita procento, la kriminologoj proponas siajn servojn

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

por konkrete observi kaj analizi la kialojn kiuj faras la firmaon objekto de ekonomiaj krimoj.

Ivan NIKOLOV (IKEF 186)

Ferŝtalo-giganto en Oriento

Laŭ enketo farita de la Esplora Centro pri Aŭstralio kaj Japanio ĉe Oceania Ŝtata Universitato, post nelonge, nome en la jaro 2000, anstataŭ Japanio Ĉinio fariĝos la lando, kiu plejmulte produktas kaj konsumas ŝtalon en Azio.

La enketa raporto klarigas ke, kvankam en 2000 Orienta Azio sume bezonos 302 milionojn da tunoj da ŝtalo - 42 milionojn pli ol en 1993 - tamen la ferŝtala industrio de Japanio neeviteble prezentos sin iom malfortiĝanta. Konsiderinte la strukturon kaj skalon de la ferŝtala produktado kaj konsumado en tiu regiono, ekonomikistoj rezonas ke la porcioj de Japanio efektive estos reduktiĝantaj.

La enketa raporto antaŭkalkulis ankaŭ, ke en 2000 eble Japanio produktos nur 85 milionoj da tunoj da ŝtalo, dum Ĉinio atingos 100 milionojn. Fakte, en 1994 la ĉina kvanto jam superis 90 milionojn. Ĝi antaŭvidas por 2000 konsumadon de 71 milionoj da tunoj por Japanio kaj 140 por Ĉinio.

Mu Binghua (Chengdu Universitato, CN-610081 SICHUAN)

Adresŝanĝo

151. Xiong Linping, Duobao Lu 9-36, CN-510011 GUANGZHU

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Eŭropa Unio: novaj trejnadaj programoj

En La Merkato 47, p. 16, mi anoncis la novajn programojn Socrates kaj Leonardo. Ĝis nun mi ne jam sukcesis akiri pli da utilaj informoj. Oni sugestis ke interesitoj kiuj havas aliron al Internet (kodo: http://www.cec.lu) tra tiu kanalo serĉu la lastajn novaĵojn pri la programoj.

Ĉiukaze, ne utilas rekte skribi al EU en Bruselo, ĉar nur eblas fari proponojn tra landaj perantoj (kies adresojn mi momente ne havas). rr

Komercaj petoj kaj proponoj

Litovio
Firmao STUNGAVO el Silute, Litovio vendas lignon kaj lignajn produktojn el norda Eŭropo (Baltaj Respublikoj, Ruslando). Peranto por Eŭropa Unio kaj Usono estas s-ro Christian Papenmeier, Germanio (fakso 0049-6171-53879).

Ruslando
Akvo- kaj gas-tuboj de metalurgia uzino; sportaj aviadiloj. Gennadij S. Mitrofanov, p.k. 36, RU-347924 TAGANROG-24, Rostovkoj obl.

Ukrainio
Perado de informoj, reprezentado, reklamaj kaj turismaj servoj; importo de konstrumaterialoj; eksporto de altkvalita blanka ŝtono (t.n. "inkerman-ŝtono"). Agentejo "esse", s-ro Aleksander Fedorov, u. Sebastopolo-57, P.O. Box 168, UA-335057 KRIMEO.

Novaj membroj

204. S-ro Frank HELFRICH, Tauberstr. 21, D-58553 HALVER
205. S-ro YANG Zhaoyin, Yardly Ideala Komerca Kompanio, 6-1, 94-long, Juqianjie, CN-213003 CHANGZHOU, f. 86-519-6683916
206. S-ino Anna BUTKIEVIĉ, p/k 130, RUS-197022 PETERBURGO